# La Karavelo

n-ro 012
nov. / dec. 2008



*Beletra Esperanto-Revuo pri la Portugallingva Literaturo*

*Fondita de João José Santos, en Portugalio, en oktobro 2007*




**LA UNUA VIDEO ELDONITA DE LA KARAVELO**

**POR PORTUGALLINGVA PUBLIKO**

**PRENU LA KATALOGON KAJ LA MENDILON EL**

**WWW.ESPERANTOPT.COM**

# La Karavelo n-ro 012
# nov.-dec. 2008


| | | |
|---|---|---|
| 1 | Kovrilo: Unua DVD eldonita de LK | El la redaktejo |
| 2 | Enhavo – Kolofono | El la redaktejo |
| 3 | Ĉefartikolo: La kokplumoj | João José Santos |
| 5 | Fernando Pessoa (poemo): Mesaĝo (31-a) | João José Santos |
| 5 | Alberto Caeiro (poemo): Mi ne zorgas pri rimoj | João José Santos |
| 6 | Notker Balbulus (poemo): Ni estas mortaj meze de la vivo | Gerrit Berveling |
| 6 | Poemoj: Ĉe lito de mia malsana panjo; Neĝo | Nikolaj Neĉaev |
| 7 | Włodzimierz Scisłowski (poemo): En laborejo | Edward Jaśkiewicz |
| 8 | Guido Gezelle (poemo): Nenies amiko | Leo De Cooman |
| 9 | Poemo: Estas paco | Imre Szabó |
| 10 | Pál Gyulai (poemo): Konsilo | Tibor J. Szabadi |
| 11 | Rakonteseeto: Kio estas poezio? | Luiza Carol |
| 12 | Poemo: Orgasmo | Eduardo Novembro |
| 13 | Rakonto: Rakonto el la transmondo | Geraldo Mattos |
| 17 | Artur Azevedo (rakonto): Plebiscito | Roger de Castro Gotardi |
| 19 | Historio: Universalaj Kongresoj de Esperanto | Djalma Pessata |
| 23 | Kroniko: Esperanto pulsas... en Karirio. Esperanto pulsas... en la gimnazio de Estremozo. | João José Santos |
| 24 | Fotoraporteto: La regiono Karirio en Brazilo... | João José Santos |


La Barko: La artikoloj enhavantaj la bildon estas la plej facilaj por komencantoj. Uzu ilin por plibonigi vian lingvonivelon, aŭ tiun de viaj lernantoj. La vortoj de la artikoloj en**bark**igitaj nur estos englosigitaj se ili ne aperos en la Reta Vortaro: http://www.reta-vortaro.de/revo/

Responso: Pri ĉiu artikolo, ties gramatiko, enhavo, stilo kaj vortprovizo responsas la koncerna aŭtoro.

Al blindaj homoj: Kunlaboru bv. por plibonigi la legadon de *La Karavelo* far blindaj homoj.

Uzado de tekstoj el *La Karavelo:* Ne uzu tekstojn el *La Karavelo* en alia publikaĵo, sen peti permeson de nia redaktejo. Havinte permeson por uzi la tekstojn, ĉiam indiku la fonton. Ekz.: El la revuo "La Karavelo", n-ro 9, junio 2008, paĝo 5 ĝis 8.

## Kolofono


***Konstantaj verkistoj...***
*Djalma Pessata*
*Eduardo Novembro*
*Edward Jaśkiewicz*
*Francisco Stefano Wechsler*
*Geraldo Mattos*
*Gerrit Berveling*
*Imre Szabó*
*Irina Mironova*
*João José Santos*
*Leo De Cooman*
*Luiza Carol*
*Nikolaj Neĉaev*
*Paulo Sérgio Viana*
*Roger de Castro Gotardi*
*Tibor J. Szabadi*
*Valentin Melnikov*

***Direktas, redaktas, kompostas***
*João José Santos*
***Asistanto pri dramo***
*João Pereira dos Santos*
***Reviziistoj***
*Imre Szabó*
*Kurt Fischer*
*Luiza Carol - pri La Barko*
*Roger de Castro Gotardi*
*Valentin Melnikov*



***Telefono*** (+351) 268 919 000
***PoŝTel.*** (+351) 960 13 15 15
***Retadreso*** ***lakaravelo@gmail.com***
***Retejo*** ***www.esperantopt.com***

***Adreso***
*LA KARAVELO – Dr. João José Santos*
Fonte Velha, caixa 3003
7100-078 Estremoz – Portugal


***Recenzeblaj libroj***
estu sendotaj al la supra adreso.

***Reguloj***
Pri la principoj, labormaniero kaj reguloj de La Karavelo, nepre elŝutu kaj legu la dosieron Regularo de La Karavelo, el la ĉefa paĝo de nia retejo. Ĝi estas konstante aktualigita.

La Katalogo de La Karavelo
estas ĉiam aktualigita en:

www.esperantopt.com

*La Karavelo*


libera softvaro
© João José M. Q. dos Santos



# La kokplumoj

**de João José Santos**



## ENKONDUKO

La kristnaska epoko portas la kristanojn al pripenso pri aferoj, kiuj troofte kaŝiĝas en la subkonscio dum la tuta jaro. Tiam la plej bona parto de nia animo elaperas kriante sian ekziston, sin trudas, kaj devigas la homon manpreni alian homon, kisi mung(aĵ)ozajn[1] infanojn kaj donaci varojn kaj monon al la mizeruloj. Poste, dum la tuta jaro, oni plu povas esti la diabloj, kiuj oni estas.

Profitante tian spiriton, ni esperantistoj pripensu teruran agmanieron, el kiu tre bedaŭrinde ankoraŭ multaj ne liberiĝis. Ne, mi ne parolas pri murdoj, pri raboj, pri ŝteloj, pri finomoj, kaj ankaŭ ne pri la dezirego posedi la aliulan inon. Tute ne. Mi parolas pri io, kies gravecon oni opinias ne granda, kaj precize tial, tio trapasas la homajn rilatojn damaĝante ilin, preskaŭ ĉiam sen ripara ebleco. Mi parolas pri klaĉoj.

## LA KLAĈO KIEL KOVARDA VENĜO

La jena belega teksto, verkita antaŭ ĉirkaŭ 140 jaroj disradias filozofian kaj etikan ecojn, kiuj tuŝas ĉiun ajn dignan homon, sendepende de la fakto, ĉu li estas religiema aŭ ne:

« **La venĝo**

La venĝo estas unu el la lastaj restaĵoj de la barbaraj moroj, kiuj iom post iom forviŝiĝas el inter la homoj. (...) La venĝo estas inspiro des pli pereiga, ĉar la falseco kaj la malnobleco estas ĝiaj konstantaj akompanantoj. Efektive, kiu forlasas sin al tiu fatala kaj blinda pasio, tiu preskaŭ neniam venĝas malkaŝe. Se li estas la pli forta, li ĵetas sin kiel rabobesto sur tiun, kiun li nomas sia malamiko, kiam la vido de tiu flamigas lian pasion, lian koleron kaj lian malamon. Sed plej ofte li kovras sin per hipokrita ŝajno, kaŝante en la fundo de sia koro la malbonajn sentojn, kiuj lin animas; li ekprenas malrektajn vojojn, sekvas en la ombro sian malamikon, kiu nenion suspektas, kaj atendas la taŭgan momenton, por sendanĝere frapi; li sin kaŝas de sia kontraŭulo kaj ĉi tiun senĉese spionas; li faras abomenajn kaptilojn kaj en oportuna momento verŝas venenon en lian kalikon. Kiam lia malamo ne iras ĝis tiaj ekstremoj, li atakas sian viktimon en ties honoro kaj korinklinoj; li ne hezitas eĉ antaŭ la kalumnio, kaj liaj perfidaj sugestoj, lerte dissemitaj per ĉiuj ventoj, iom post iom amasiĝas sur la vojo. Sekve, prezentante sin en la lokoj, kie pasis la venena blovado de la hipokritulo, la persekutato miras, tie trovante nur malvarmajn vizaĝojn, kie li antaŭe vidadis amikajn kaj bonvolemajn mienojn; li konsterniĝas, kiam la manoj, kiuj iam serĉadis la lian, nun rifuzas ĝin premi; fine li sentas sin neniigita, vidante, ke liaj plej karaj amikoj kaj parencoj deturniĝas de li kaj lin evitas. Ha! la fiulo, kiu tiel venĝas, estas centoble pli kulpa, ol tiu, kiu alfrontas sian malamikon kaj lin insultas rekte en la vizaĝon.»[2]

Sendepende de la kredo de la leganto, certe ĉi tiu teksto pensigas onin pri la kovardeco, kiu konsistigas la klaĉon.

Krom la personaj damaĝoj, la klaĉa etoso ruinigas la grupojn, pro la disfaligo de l' fido kaj de l' amikeco inter la homoj. Do, kiam esperantisto uzas recenzon, kiu esence estas scienca aprezo de verko, por siaj venĝetoj; kiam esperantisto klaĉas kontraŭ aliaj, en la reto aŭ ekster ĝi; kiam esperantisto konfuzas kontraŭstaron de vidpunktoj kun homa kontraŭstaro; kiam tio okazas, miaj amikoj, tiu homo ne estas esperantisto. Li uzas esperanton por servi sian umbilikon, li uzas esperanton por amuzo, sed mankas al li responsa senco, mankas al li la grandanimeco de tiuj, kiuj balotas por

1 Infanoj kies nazoj ofte estas plenaj je muko. Tio bedaŭrinde okazas al stratvagantaj infanoj, kiuj nur estas kisataj de gravaj politikistoj en balotaj kampanjoj kaj en la Kristnasko.
"Mungi" - purigi la nazon farante por tio ne agrablan bruon.

2 KARDEC, Allan, *La evangelio laŭ spiritismo*, (el la franca esperantigis Ismael Gomes Braga), FEB, paĝoj 211-213. Interesatoj povas preni ĉi tiun kaj aliajn spiritismajn librojn, en pdf-formato, en la sekcio "spiritismo", el: http://www.esperantopt.com/dosieroj.html

esperanto, kiel instrumento por la paco kaj la feliĉo inter la homoj. Kiam oni sekvas la lumon de l' humanisma espero, la cirkonstancaj disputoj ne enrankoriĝas en la animon, kaj do oni plu respektas la aliajn homojn, ne disfamigante ilin per klaĉoj.

## LA KOKPLUMOJ

Ie mi aŭskultis ĉi tiun rakonteton, kiu nun estas reproduktita en esperanto, kun aldonaj farberoj de la nuna rakontanto.

«Iu sinjorino estis terure klaĉema. Tiaj homoj estiĝas veraj specialistoj pri tia fako: la klaĉo. Ŝi bone sciis lanĉi la dubojn en la spiriton de la aliaj, tiel ke, pli rapide ol fajro en ĝangalo, la mensogoj kaj la ver-duonaj mis-informoj disfamiĝis tra la tuta vilaĝo.

Jam maljuna, pro antaŭsento kaj timo de mortproksimiĝo, ŝi pentis, kaj iris al la preĝejo por paroli kun la pastro, demandante de li, kiel ŝi povas ripari la damaĝon truditan de ŝi al la aliaj homoj, per vivo el klaĉoj.

La pastro pripensis kaj diris al ŝi:

– Sinjorino, dum via tuta vivo, vi tro klaĉis. Tiuj klaĉoj damaĝis la feliĉon de multaj homoj, vi tristigis multajn, kaj eĉ detruis, per viaj klaĉoj, kelkajn vivojn. Tamen, mi povas proponi solvon por iom pacigi vian spiriton. Tiu solvo havas du fazojn.

La sinjorino atentege aŭskultis ĉion, kaj petis de la pastro:

– Jes, bone, kara pastro, ĉion kion vi petos, mi faros, por ke mi ne hontu post mia morto.

– Do, aĉetu unu kokon por ĉiu homo de nia vilaĝo. Eltiru ĉiujn plumojn el ĉiu koko, iru ĉe ĉiun homon de la vilaĝo, donacu al ili po unu kokon, kaj dissendu al la vento, ĉe la enirejo de ĉiu pordo ĉiujn plumojn kaj plumetojn de la koncerna koko, kiu restis en tiu hejmo. Faru tion en ununura tago. Vespere de tiu tago, venu ĉi tien, por ke mi vin diru, kion vi faru en la dua fazo.

– Koran dankon, sinjoro pastro. Mi tion faros tre baldaŭ.

La sinjorino aĉetis centojn da kokoj, unu por ĉiu vilaĝano. Ŝi demetis ĉiujn plumojn de ĉiu koko, metinte ilin en bolantan akvon, kaj rigore gardis ĉiujn plumojn de ĉiu koko kun la koncerna koko, en apartaj sakoj, por ilin doni al la vento ĉe la enirejo de la homo, kiu ricevos la kokon.

En unu tago, ŝi kapablis donaci centojn da kokoj, kaj ŝi malpurigis la tutan vilaĝon per milionoj da plumoj, kiuj flirtis kaj disiĝis ĉien. En tiu vespero, ŝi revizitis la pastron, laca sed kontenta, ĉar unutaga trolaboro, por tiom da klaĉoj dum tuta vivo, ne ŝajnis al ŝi granda peno.

– Bone, mia filino – komencis la pastro – nun vi devas plenumi la duan fazon. Vi devas preni ĉiun el la milionoj da plumoj, kiuj nun flirtas en la vilaĝo. Ĉiu el ili estas unu el viaj ĵetitaj klaĉoj dum via vivo.

– Sed tio estas malebla, pastro! – tristiĝis la sinjorino – neniu kapablus repreni ĉiujn plumojn nun milione flirtantaj ĉie...

– Jes, mia filino, vi pravas. Neniu kapablas ripari vivon de klaĉado.»


La Unua Katalogo

jam disponeblas el

La Karavelo

www.esperantopt.com



TIE, I.A., VI EKKONOS LA KVAR EBLECOJN LEGI NIAN REVUON EKDE JANUARO 2009

## Mesaĝo - de Fernando Pesoo

### el la portugala tradukis João José Santos

**12. PREĜO**

Sinjor', noktiĝis kaj l' anim' mizeras.
Grandis la vol' kaj la dolora pado!
En damaĝa silento nun postveras
l' universala mar' kaj la saŭdado (1).

Sed pri kreita flam' far viv' en ni,
se plu l' animo blovas, ĝi plu vivas.
Sub cindroj kvazaŭmorte fridas ĝi:
la mano de la vento ĝin pufivas.

Donu la blovon, kiu la streb-flamon
renovigas, domaĝan aŭ anksian,
kaj rekonkeros ni re la Distancon -
de l' maro aŭ alian, sed la nian!


(1) Simile al nostalgio, sopiro, hejmvoko kaj aliaj sentoj, sed ne nur. Iam aperos artikolo pri tio en LK. Ĝi temas pri grava ero de la portugaletna kulturo.



## Mi ne zorgas pri rimoj

### de Alberto Kaejro [1]


### el la portugala tradukis João José Santos



Mi ne zorgas pri rimoj. Malofte
estas du egalaj arboj, unu apud la alia.
Mi pensas kaj skribas, kiel la floroj havas la kolorojn,
sed malpli perfekte en mia maniero esprimi,
ĉar mankas al mi la dia simpleco
esti nur ĉio mia eksteraĵo.

Mi rigardas kaj emociiĝas,
emociiĝas mi kiel la akvo fluas sur klinita surfaco,
kaj mia poezio estas natura kiel ekventiĝo...

1 Portugale *Alberto Caeiro*, unu el la plej gravaj heteronomoj de Fernando Pesoo. Pri la koncepto pri heteronomo, legu ĉe La Karavelo n-ro 1, paĝo 6.


Foto: Gerrit Berveling

## *Meze de l' vivo en mort' ni estas*

***(latine: Media vita in morte sumus)***

***de Notker Balbuta (Notker Balbulus, 840-912)***


***el la latina tradukis Gerrit Berveling***

*Malgranda, tre fama kanto, karakteriza pro la Mezepoka mensostato. La tuta vivo ja estas necerta, ĉu ne? Krom en sia vundebla vero. Savas nur Dio.*



Meze de l' vivo
en mort' ni estas.
Kiun serĉas ni kiel helpanton,
krom Vin, Sinjoro?
Kiu pro niaj pekoj
prave koleriĝis.

Sankta Dio,
sankta fortulo
sankta kaj kompatema savanto:
Al amara morto ne lasu nin!


Foto: Nikolaj Neĉaev

***de Nikolaj Neĉaev***

## Neĝo

Pro l' paŝoj knaras
La blanka mol'.
Mi versojn faras
El la tavol'.
Mi versojn skulptas
El neĝamas'.
Mi belon kultas
Por Verda Ras'.

## Ĉe lito de mia malsana panjo

Simplan ĝojon mi ekŝatas:
Mian panjon mi kompatas
Kun persisto, kun esper'
Dum malsano, dum sufer'.
Dum malsano mi konkludas:
Mi feliĉas ĉar apudas
Mia panjo - mia ĝoj'
Kaj plu helas mia voj'.


Foto: Jaśkiewicz

# En laborejo

**de Włodzimierz Scisłowski**

**el la pola tradukis Edward Jaśkiewicz**



En laborejo socialisma
Jam forpasinta, la altruisma,
La faciligoj estis diversaj.
Kompare nunajn tute inversaj.
En laborejo la Sindikatoj
Biletojn ankaŭ kun la rabatoj
Aŭ tute simple – ankaŭ senpage
Donantaj estis eĉ ĉiutage.
El laborejo multo devenis,
Ĝuste vi tion eĉ ne divenis.
De Sindikatoj laŭ ĉies revo
Zorgo pri homo estis la devo.
El laborejo la trajnbiletoj,
Kristnaskaj karpoj kaj abietoj.
El laborejo ankaŭ leporoj,
Terpomoj, fruktoj, ovoj kaj floroj.
Bilet' senpaga por la: koncerto,
Kino teatro, ali-oferto;
Kiel flosado per la kajako
Sur „Czarna Hańcza" – rivera trako.
Vi unufoje dum ĉiu jaro
Povis ricevi por infanaro,
Tiel nomitan la kolonion,
Kiu ja kostis preskaŭ nenion.
Okan de marto, dum virinfesto
Laboristinojn kun ĝentilgesto
Ĉefoj regalis per diversaĵoj:
Per bombonujoj kaj eĉ vestaĵoj.
Per fuŝkvalitaj ŝtrumppantalonoj,
Aŭ per nomataj la vartalonoj,
Sed antaŭ ĉio per printempfloroj
Laŭ la regantaj tiamaj moroj.



* * * * * * * * * * * * * * * * *




KIEL VI VOLAS GARDI LA PERLOJN
DE NIAJ VERKISTOJ?
ĈU EN PAPERAJ LIBROJ?
ĈU EN DVD?

KONSULTU LA LK_KATALOGON EN

www.esperantopt.com




Foto: Leo De Cooman

*el la flandra tradukis*
*Leo De Cooman*

# *Nenies Amiko*

*de Guido Gezelle*

(flandre *Niemandsvriend*. En 6/9/1895)

Vi, kiuj vivi en urbo kutimas,
cerealon de Dio nur konas
prezentatan paniĝintan kaj nutran;
kaj ne scias kiom ravas
la aspekto de l' verdaĵo
laŭ borderoj de la vojoj,

pri herbaĵo kreskanta malalte kaj alte
pri verdaĵo floranta en herbejoj;
pri vicio birda kaj furaĝa,
pri plantago, stelario kaj papavo;
pri glekomo, persikario kaj fragmito,
pri rumekso kaj pri kardoj.

Aĥ kardo, vian pikan haregaron
mi ekkonis nur
per onidiroj;
avertiĝis mi per la dirantoj,
ke ĉie vi regnas en l' agroj
por tie bredadi malbonon.

Mi ne konis vin kaj krome
ne deziris vidi vin proksime
kaj certe ne vin tuŝi,
ĉar konatas tia tuŝo
pro malbono kaj fifamo
ĉie ĉe la kamparanoj.

Insulte oni diras ke vi, ĉies malamiko,
nur utilas kiel nutr' al azeno;
pikilojn viajn timas ĉiu;
kiu belon tamen vidas en ĉiu Dia verko
kaj en ĝi trovemas la bonon,
ne insultas tiom vane.

Insultas oni ... eĉ pli grave, oni aŭdas,
ke laŭ leĝo kaj ordon' de la reĝo,
oficiale kaj totale
oni kardan vegetaron
falĉe kaj fosile neniigu,
de la ter' ĝi ekstermiĝu.

Indulgon por la herbo humila,
kiun tiom - ho ve - vi malŝatas:
Rigardu kiel ŝtonojn kaj rubon,
per kiuj la perforto de l' urbanoj
turmentas la kamparon,
per verdaĵo deca ĝi rekovras.

Rigardu. Sur ĉiu tigo - kiel ĉarme -
kardokapeto supren tenas siajn florojn
jam tute aŭ nur parte el burĝonoj;
tiom pura, de neniu jam tuŝita;
kolumo brilas ĉirkaŭ ĉiu florkapeto,
de freŝa roso prigutita.

Rigardu kiel skvama karda hararo
de ŝpinaĵ' aŭtuna ĉirkaŭatas
kaj de aranea punto,
moviĝanta sub la suna fajro,
en ventet' ekbrilanta
plena je pulvor' diamanta.

Kiel flirtema pierido saltas,
ĉi tien, foren, kaj frandemas
por ŝteli el la infloreskoj,
nutraĵon de antaŭ l' abelaro
kiu ĵaluze vidas ĝin alflugi
vizitantan ĉiun kardon.

Mi ne flaras, kie preparatas
ĉarmo de balzamoleo,
odoron pli agrablan ol ĉi tiu,
kiun distilas kardaj floroj
dum somero, frue kaj malfrue,
kie abundas floroj en kardejoj.

Rigardu kiel sur kapet' maljuna
flugema semo supren hastas,
sin sur ĉiu vento levas
por ie, kie neniu ĝin vidas,
senmorte liberiĝon trovi
iam je renaska tago.

Tiel, kardoj, vi ĉiam vivas plue,
de leĝo kaj de reĝo ordonema
malpermesitaj, ekzilitaj;
kvankam longe ili jam komplotas
por sufoki vian povran semon
en la loko de naskiĝo.

Kardo, vin prave aŭ malprave,
Vin iam, amiko de neniu,
ne malŝatos malestime
ĉi flandra koro, videmanta ne profiton
sed la belon en ĉiu verk' de Dio
kaj trovemas en ĝi bonon.



Foto: Imre Szabó

**de Imre Szabo**

# Estas paco



La kadavroj jam forportataj
nun oni lavas jam la trotuaron
la ruĝa akvo fluas en la kanalon
aŭdeblas la buldozeroj fore
nun ili ekiras kaj puŝas-puŝas
la teron en la grandan kavon
en kiu la ostoj puriĝos blankaj
disde la suferanta karno

Estis pura laboro
estas nun paco jam
florojn ĵetos la popolo
antaŭ la botojn
de la venkmarŝantoj

Neniu memoros tiam plu
pri la milda siringoarbusto
pri la hejmokaŝaj fenestroj
pri la invitaj dompordegoj
kiuj ĉiuj vomis la plumban morton
ankaŭ pri la serena ĉielo
neniu plu memoros jam
kiel ĝin plenigis bomboj

Ĉio komenciĝis pace
preskaŭ kaprice ŝerce
oni elektis en la ludo
la nigran ŝafon
kiu devis sin kaŝi
la aliaj serĉis lin
por malkovri
pasis la tempo
kie en la diablo li estas
ĉiu devus jam iri hejmen
iuj jam eĉ iras
kaj tiam la aliaj retrovis lin
kolere furioze
senindulge draste ili draŝis lin
fine ekfulmis la rapida klingo
disŝiriĝis la kriego
Sed ni nur ludas! Sed ni nur

Kiel la porko buĉota
ni mem donas nin al la manoj
de la buĉistoj
vane estas la invita vasta
kampo de rifuĝo
ni ne volas fuĝi
ja ni estas senkulpaj
ni forte scias ke ni
estas senkulpaj senkulpaj senkulpaj

Nur la laboron vi perdis hodiaŭ
sed morgaŭ vi perdos la vivon
vi ne rimarkos kiel vi aperis
por dormi sub la pontoj
vi ne rimarkis kiel aperis sur vi
la uniformo la mortobotoj
vi estas senkulpa senkulpa
sed nun murdi aŭ esti murdata

Ni ĉiuj senkulpas estas sciate
tamen ie iam ni ekludis
ekludas false fuŝe
kaj ni mem staros ĉe ambaŭ
ekstremoj de la pafiloj
vico da nukpafoj
ni estas senkulpaj senkulpaj senkulpaj
stertoras-tondras la transvivantoj

La mortintoj milde-mute
purigas siajn ostojn
subplande profunde



Foto de Tibor Szabadi

***Tibor J. Szabadi***

***verkis la biografion***

***tradukis la poemon el la hungara***



**Gyulai Pál** (djulai paŭlo)
Kolozsvár /Koloĵvaro/, 25-an de januaro en 1826
Budapest /Budapeŝto/, 9-a de novembro 1909
Hungara literaturkritikisto, poeto, verkisto,
universitata profesoro, verko-kritikisto

Li lernis en la kalvina kolegio de Kolozsvár. De 1845 li estiĝis edukisto de la infanoj de Bethlen János. En lia 16-jaraĝo jam aperis iu lia poemo, kaj en 1848 – tiam 22 jaraĝa – ĉar li skribas pri la liberecbatalo – per lia poezio, estiĝis populara poeto. Li devenas el Transilvanio kie naskiĝis kiel nobelulo. En 1848, en la urbo Kolozsvár, li estis iu estro de la ribelaj gejunuloj, sed mem en la revolucio aktive ne partoprenis. Li estis sekretario de la pac-partia politikisto Teleki Domokos en Pest, Gernyeszeg, poste ankaŭ en Pest. En 1850 li komencis sian agadon kiel kritikisto. Li studis en Berlin, Parizo, München. Ekde 1858 li instruis en urbo Kolozsvár. Je la fino de jaroj 50-aj, li jam estiĝis amiko de Kemény Zsigmond, Csengery Antal, kaj Arany János. En 1858 li edziĝis kun Szendrey Mária, kiu estis bofratino de Petőfi Sándor. En 1860 Gyulai estiĝis ano de la Kisfaludy Társaság (Societo Kisfaludy). En 1862 li revenis en urbon Pest kaj helpredaktis la revuon Szépirodalmi Figyelő. Ĝis 1867 li estis la sekretario de la Hungaraj Verko-helpantoj. En 1870 li estis klas-sekretario de MTA (Hungara Scienca Akademio). Ekde 1873 redaktis li la revuon Budapesti Szemle. Inter 1876-1892 li estis profesoro en Budapeŝto, posteulo de Toldy Ferenc. Ekde 1879 li estis prezidanto de Kisfaludy Társaság, de 1885 li aniĝis al la hungaraj grandnobeloj. En 1899 li rezignis pri la prezidanteco de Kisfaludy Társaság, en 1902 li forlasis ankaŭ la univesitaton.

## ***Konsilo** de Gyulai Pál*

hungara titolo: *Tanács (*1876)

Estas kiuj vin amas kaj kiujn vi amas.
Vin se ili ofendas, se ili vundas
Ne koleru pri ili longe!
Sed korelverŝu, se vi forviŝus
Pro dolor' superfluitan larmon:

Pardonu! Kredu, tio faciligos vin.

Ho kiomfoje ni miskomprenas unu l' alian,
Kiomfoje niajn amatojn ni ofendas,
Kvankam tion nia koro ne volas.
Eble ni sangas pro tiu vundo,
Eĉ doloras por ni, pli akre,
Sed nia fiereco tion ne konfesas.

Ne estu fiera, estu sincera,
Fidelul' via tuj tia fariĝos,
Dividiĝas suspekto, mildiĝas tristo;
Tute hazarde venus nia morto
Se de unu la alia kolere disiĝos,
Ĉe la tomb' estas malfrua la pardono!




Foto: Luiza Carol

**de Luiza Carol**

# Kio estas poezio?

Mi loĝis en Bukareŝto ĝis la aĝo de 33, t.e. ĝis 1980. Dum la infaneco, mi neniam demandis min, kio estas poezio, ĉar la afero ŝajnis al mi ege simpla: ajna teksto kun rimo kaj regula ritmo estis por mi poemo. Tia estis la ĝenerala pensmaniero en Bukareŝto, tiam. La lernantoj alkutimiĝis parkeri tre multe.

Kiam mi iĝis studento, multaj rumanaj poetoj, precipe la junaj, komencis verki eksperimentan poezion, senriman kaj sen regula ritmo, laŭ la nova modo en la okcidenta Eŭropo kaj en Usono. La anglalingvanoj kaj la franclingvanoj nomis tiajn versojn liberaj versoj, sed la rumanaj poetoj preferis nomi ilin eksperimentaj versoj; alimaniere, la *Sekuritate* (t.e. la sekreta registara polico) povus suspekti, ke la poetoj sopiras pri mankanta libereco... Ĉu ne estis libera la tuta kulturo, dum la tempo de la rumana fidiktatoro?!

Sed enkaĝigi la vaporan birdon de la poezio malsukcesis eĉ la plej aĉaj diktatoroj en la historio... La tiutempaj eksperimentaj poemoj kapablis esti pli spontanaj ol la rimitaj, aŭ almenaŭ ŝajnigis pli da spontaneco. Multaj el ili prezentiĝis kiel priskriboj de sonĝoj, sed koŝmaroj ili estis, malkaŝante verajn timojn kaj suferojn pri kiuj la poetoj ne kuraĝus skribi sen la mantelo de ŝajna spontana sonĝo. Multaj poemoj ŝajnis verkitaj laŭ ĝisfunda spontaneco de pensfluado, kun nefinitaj esprimoj, el kiuj mankis kelkaj kunligaj vortetoj, rolvortetoj aŭ aliaj specoj de vortoj. Kelkfoje, la mankanta elemento povus esti eĉ la subjekto aŭ la verbo. Sensencaj tekstoj ili ŝajnis laŭ la unua legado, ĉar gramatike ili ja estis sensencaj kripligitaj frazoj, aroj da diskunigitaj vortoj. Sed kiam oni penis ligi la vortojn en sia menso, aldonante mankantajn elementojn, belegaj bildoj kaj emociigaj pensoj povis aperi, laŭ la imagpovo de la leganto. Tial, la ŝajne sensencaj poemoj iĝis fakte plursencaj kaj atentokaptantaj. Nu, el tia senkulpa ludo povis aperi kelkfoje danĝeraj asertoj pri la rumana registaro, groteskaj karikaturoj, tiklaj humuraĵoj, plursignifaj ŝercoj... Tiajn trukojn oni nomis lacertoj en la junulara ĵargono, ĉar la veraj intencoj de la aŭtoro kaŝis sin malantaŭ vortoj kiel lertaj lacertoj malantaŭ ŝtonoj. Poste, aperis en la ĵargono la dukapaj lacertoj, la plurkapaj lacertoj kaj eĉ la ekstravaganca raso de sabloglasaj lacertoj. Tiuj ĉi estis renverseblaj kiel sabloglasaj horloĝoj; ekzemple, oni povis kompreni poemon kiel entuziasma laŭdo por la diktatoro, sed ankaŭ tute inverse.




La simplaj, spontanaj, facile verkeblaj eksperimentaj poemoj alportis iom da freŝa aero de libereco kaj sincereco en la rumanan literaturon. Tamen, tre multaj opiniis, ke eksperimenta poezio tute ne estas poezio, do ne indas paroli pri ĝi dum seriozaj literaturaj diskutoj. La literaturaj kritikistoj kontraŭdiris unu la alian akre, malkonsentante ne nur pri kio estas bona poezio, sed ankaŭ pri kio estas entute poezio. Multaj el ili konsideris sin des pli inteligentaj kaj kleraj, ju pli akre kaj aĉe ili malaprezis ĉiujn verkojn krom siaj propraj.

Ĉirkaŭ la jaro 1967, dum mi estis studento ĉe la fakultato, pri la angla kaj rumana lingvoj kaj literaturoj, usona instruisto pri literaturo vizitis nian fakultaton. Li prelegis dum kelkaj monatoj pri Emily Dickinson, la fama usona poetino de la 19-a jarcento, kiu estis ankoraŭ tute nekonata por la tiamaj studentoj en Bukareŝto. Dickinson, malsame al aliaj anglalingvaj samtempaj poetoj, aŭdacis uzi malperfektajn rimojn, malperfektan ritmon, kaj ofte la longo de ŝiaj versoj estis tute malregula. La delikata muziko de ŝiaj revoplenaj poemoj ŝajnis al ni tute stranga, mistera, fascina. Foje, la usona instruisto babilis kun ni pri la poemoj de Emily Dickinson, kaj la diskutoj atingis la tiklan demandon: *Kio estas poezio?* Tiam, li skribis sur la tabulon, en la angla, la jenajn vortojn unu sub la alia:

*ĉielo*

*ĉiu*

*tago*

*Ĉu tio estas poemo?* li demandis nin. Kelkaj el ni neis, aliaj jesis. Iuj kiuj neis opiniis, ke temas pri diskunigitaj vortoj. La aliaj opiniis, ke tiuj vortoj pensigas onin pri la grandioza eterna beleco de la ĉielo, kiun ni povas vidi ĉiutage; do temas pri tri-vorta poemo, kiu sentigas onin kiel parto de la universo…

Kiuj pravis? Je nia surprizo, la usonano pravigis nin ĉiujn. Li diris ke, laŭ sia opinio, la poemo vivas nur per la emocio de la leganto. Kiam la leganto ne sentas ajnan emocion, la teksto ne ekzistas kiel poemo por tiu ĉi leganto. Ju pli multe la leganto emociiĝas, des pli bona estas la poemo por tiu ĉi aparta leganto. Do, la demando *Ĉu tio estas poemo?* ŝajnas tro ĝenerala, kaj ĝi devus aliformiĝi en la demandon: *Ĉu tio estas poemo laŭ vi, nun?*

Laŭ la tiamaj rumanaj seriozaj (eble tro seriozaj) profesoroj pri filozofio kaj literaturo, tia tipa usona pragmatismo ŝajnis pruvo de aroganta malklereco kaj ridinda stulteco. La diafanan nemalican humuron de tiu leciono… ili misis. Ĉi-momente, skribante tiun ĉi travivaĵon, la tuta afero jam ŝajnas al mi infanece simpla. Sed en 1967 en Bukareŝto, tia vidpunkto impresis la studentojn, ĉar ĝi aspektis originala kaj aŭdaca. Fin-fine oni ne prelegis al ni pri kio bona poezio devas esti. Kaj oni malrespektis nenies pensmanieron. El tia vidpunkto, la celo mem de onia lernado pri literaturo ne estas la memorado de devigaj reguloj kaj ŝablonoj, sed la klopodo transpasi siajn limojn, partopreni la emociojn de la aliaj kaj ĝui pli multon el la beleco de la vivo. Mi ŝatis tian sintenon kaj daŭre ŝatas ĝin. Ĝi ebligis min poste ekkoni kaj tutkore ĝui kiel eble pli buntajn stilojn de poezio el diversaj landoj kaj kontinentoj, el diversaj epokoj.

Ĉirkaŭ kvar jardekoj pasis de tiam. Mi de longe ne plu demandas min, kio estas poezio. Kiam oni amas, oni kutime ne havas tempon difini amon. Kiam oni ĝojas aŭ malĝojas, oni kutime ne bezonas demandi sin, kio estas ĝojo aŭ malĝojo. Kaj kiam oni poemumas…

* * *



***de EdNov***

**O R G A S M O**

Plej supera sublimo
  kulmino koita
  amora genezeksplodo
  vivokreiva.

Plezuriga homa faro
  seksumiĝo voluptavida
  jena pluado
  gentospecia.

Efemera kuniĝo
  tamen prisema
  ĝerma spuro
  embriiga.

Animaldeviga misio
  ago fekundema
  cele reproduktado
  posteulara.

Sed...

  se faro tia
  ne estus plezuriga?

Male...

  se ĝi estus doloriga?


Foto de Geraldo Mattos

***de Geraldo Mattos***

## *Rakonto el la transmondo*

Estis foje mi, kiu subite svenis kaj mi tute ne scias, kiom da jaroj kaj jarcentoj mi estis tia, ĝis iam mi povis reveni el sveno, kaj mi subite konsciiĝis, ke mi mortis. Kaj mi trovas tre malagrable esti mortinto... precipe en la cirkonstancoj, en kiuj mi mortis kaj nun staras: litere mi staras, kvankam mi svenis kuŝanta dum jaroj kaj jarcentoj kaj mi subite rekonsciiĝis staranta kaj mortinta, eble mortinta kaj staranta, mi havas nenian eblecon tion kontroli...

Mi estis dum mia tuta vivo SATano kaj satano, pli da dua ol da unua...

Kiel SATano mi batalis por Esperanto, sed ĉiam per armiloj en la manoj, kaj tiun, kiun mi ne konvertis, mi mortigis. Malmultajn mi devis mortigi, ĉar ĉiu konas mian famon de fanatika esperantisto... ho ne! – mian famon de fanatika SATano.

Unu el la unuaj aŭ unu el la lastaj – mortinto havas bonan aŭ malbonan memoron, mi ankoraŭ ne scias, ĉar mi estas freŝdata kadavro...

Kion mi diras? Ĉu kadavro?!... Kiam mi estis vivanto [nun mi estas vivinto kun ĉia diplomo skribita per sensangeco], mi sciis, ke kadavro ne parolas kaj ke ĝi fetoras, sed nun mi parolas kaj ne fetoras: cetere, ĉu mortinta povas flari? Ho ve... ŝajne kaj verŝajne mi devojiĝis, kaj mortinto ne havas memoron. Bone estas tamen, ke mi tajpas per komputilo kaj mi nun revenas kelkajn vortojn supren. Aĥ... mi volas trovi por povi kovri pliajn paĝojn per literoj kaj inferoj... Mi min alreligu!

Unu el la unuaj aŭ unu el la lastaj – ĉi tie mi haltis, kaj de ĉi tie mi saltis al personaj informoj, kiujn mia geleganto absolute kaj strute devas ignori antaŭ ol min devori - pro nenio kaj Dio! - kuirita, ne fritita... Mi jam pli kaj pli forgesis, ke nenio doloras mortinton...

Kaj denove mi depadiĝis... Kie mi estis kaj nestis?! La vivanta mio estis racia homo, sed la vivinta mio ŝajne estas io alia. Mi min alreligu!

Unu el la unuaj aŭ el la lastaj estis Frato Rejnaldo, kiun mi mortigis nur pro tio, ke li herezis per neniam Fundamenta vorto, kiun li vortis. Mi aŭdis, ke li parolas Esperanton kaj tiam mi estis ĵus bakita verda pano, tiam nek SATano nek satano, sed naiva seminariano, kaj mi iris al li kaj de tiam mia destino estis jam difinita en ĉiuj siaj linioj kaj kurboj, pli da ĉi ol da tie...

Mi haltigis lin sur la koridoro, kaj lin demandis:

- Ĉu vi parolas Esperanton?

Mi ĵuras, ke mi metis akuzativon en tiu frazo, kvankam tiam mi estis esperanto-parolanto nur de kelkaj tagoj, kaj memlerna ...

Eble mi vivanto estis instruisto, ĉar venis nun al mia kapo tre facila regulo:

- Metu akuzativon sole nur tiam, kiam estas eble meti ene de la sama frazo la lokon de deiro aŭ de eliro.

Kaj de kie aŭ el kie ni povas meti akuzativon en frazo?!...

Evidente de nenie kaj el nenie: akuzativo ne loĝas ie, de kie aŭ el kie mi povas ĝin demeti! Cetere, se mi pensas pri la loko en la frazo, mi devas akcepti, ke la loko ekster la frazo estas la tuta universo, sed infinito estas frenezaĵo... Ni povas tamen el maldekstre de la verbo meti la subjekton dekstren de ĝi...

Kaj per la supra diskuto kun mi mem, senvole mi malkovras alian econ de mortintoj: ili estas tedaj, se mi estas ekzemplero.

Al mia tre simpla demando, kiu tenis nenian misteron, nek mislunon, nek missunon, mi nur atendis, ke li respondos per jes aŭ ne, sed ne per la neakceptinda vorto, per kiu li respondis kaj pro kiu li mortis, rekta ofendo al la Fundamento de Esperanto kaj tial perfekta invito al subita mortosendo:

- Poke...

Knabo ne havas armilon, sed havas okulojn: mi lin rigardis, kaj ordonis al mia cerbo, kiu ordonis al miaj okuloj, kiuj ordonis al lia koro, kiu ordonis al sia cerbo, kiu obeis kaj li do mortiĝis... Mi rigardis lin kaj vidis lin

mortanta per tia fulma morto, kiun ĉiu kredis lin mortinta post koratako...

Mortigi estas facile: doloras neniom! Kelkaj kredas je konscienco, sed tio estas io karna kaj do putriĝa...

Ili tamen min forkondukis de la Seminario aŭ mi mensogis, ke mi atakis la fruktoĝardenon kaj malaperis en la mondon por aliaj satanaĵoj.

Nur poste mi fariĝis SATano, sed tiam kaj ĉiam mi atribuis tiun mian antaŭunuan mortigon al mia SATaneco. Mensogo!...

Mi tamen scias, ke ne al mi SATano devas esti atribuataj tiaj misagoj, sed al mi satano, sed mensogi estas rajto de mortinto. Mi memoras, ke ie supre mi parolis pri mensogo, ĉar tie mi mensogis, sed ne rakontis – eble ĉar mi estas mortinto kaj morto estas vivokonkordato aŭ vivo estas mortokonkordato, mi estas iom febra pro mia mensogo, kiu temas pri io tenebra...

Kiel satano mi batalis por mi mem, sed ĉiam per armiloj en la manoj: mi neniam ŝtelis, sed ĉiam rabis; mi neniam min defendis, sed atakis; mi neniam petis, sed deprenis.

Mi timis nenion nek Dion... Kaj nun mi vidas, ke supre nenie kaj neniam mi parolis pri timo, nek pri mensogo... Mortinto ne havas bonan memoron, kaj ni – mi ne scias, ĉu estas aliaj mortintoj! – mi havas tutan eternecon, kaj tio klarigas, ke mi havas nenian tempon, ĉar milono da eterneco estas mem eterna... Milono... memorigas min pri paĝo www.gmverda.com.br kaŝita en mia memoro: kiu estas la plej valora vokalo de Esperanto? Mi nun scias: la vokalo, kiu ŝanĝas milonon en milionon... Ah he [hi] ho hu: tio ne estas temo de mia problemo!

Mia sola bona eco estas neniam mensogi, sed ĉiam estas la unua aĵo por ĉio, eĉ por mensogo. Antaŭ kelkaj vortoj mi mensogis grandan mensogon, kiam mi diris, ke mi timas nenion nek Dion. Vere mi ne timas ilin, ĉar kun neniu el ili iam mi renkontiĝis, kaj do mi ne povas diri, ke mi ne timas ilin: eble mi senkonscie timas ilin, verŝajne nur la duan... Se ne tio estas la mensogo, kiun mi mensogis...

- Voku min!

Pro nenio kaj Dio!... Kial mi volus, se mi ne scias, kiu min vokas, kaj jam la sesan fojon mi devus ripeti la supran duvortan alineon... kaj por mortinto spaco estas tre grava, ĉar ni havas malgrandan landon kun malgranda regiono: tombo. Mi do denove:

- Kiu vokas?

Nekredeble, ke venis tuja respondo, sed nur post la sepa, kiu estas la vico de mensoganto:

- La dormo! Via dormo...

Mi sakris:

- Diablon... Dormi estas mismorti, kaj mi jam mortis: kial dormi?

- Dormi estas vivige...

Kia stulta respondo, kiu estas ne dormo, sed pezumo, la freneziga kaj mortiga speco de sonĝo. Mi do reagis:

- Fi!... Dormi estas mortige.

- Se vi dormos, vi ne suferos...


- Mi ne suferas, sed mi angoras de post mia mensogo.

- Dormu! Dormu! Dormu! Dormu! Dormu! Dormu! Dormu!

Al la sepopa ordono [se popa, dancebla] mi respondis trioble:

- Mi mortis. Mi mortis. Mi mortis.

Por mortinto dormo estas dua kaj plua morto...



Kaj estas horo malkovri mian mensogon, ke mi timas nenion nek Dion...

Mi ne timas: mi timegas mallumon!...

Ekde kiam mi svenis kaj sensveniĝis, mi vidas – pardonu min! – mi sentas, ke mi estas tenata en skatolo, kies interno estas

ĝuste la formo de mia ekstero, sed certe ĝia ekstero estas tiu de ordinara ĉerko: mi do estas senmova kaj en terura mallumo, kiu tamen ne estas ruro el teo, sed simpla mallumo, por kiu okulo estas nulo: povas eĉ esti, ke mi fariĝis semo en frukto...

Tiu, kiu elektis por mia malbenita vivo ĉi tiun punon, bonege konis min kaj mian solan malecon: malamo al mallumo. Mi preferus esti pakata kaj resti pakita per ŝtalaj dratoj kaj esti metata kaj resti metita en fajro, sed ne ene de mallumo, kies alfabetumo estas al mi tute nekonata...

- Ĉu eterneco ne estas sufiĉa puno por momenta krimo?

Tiu mia retorika demando igis min senforgesigi poemon de Geraldo Mattos, kies sola difekto estas lia konfeso, ke li ne timas (Mattos, 1968, p. 44), kiu verŝajne estas nur pruntepreno de mia supra plendo, certe antaŭa al lia verkaĵo, ĉar mi estas en eterneco sen pasinteco, sen estanteco, sen venonteco:

**ETERNA PUNO**

Jen la pekulo ĉe la lasta horo:
li ĝemas, turmentiĝas, agonias,
ĉar la rimorso karnoŝire krias
ĝis plej interna parto de la koro.
Ho Dio de justeco kaj rigoro,
pri via juĝorajto mi konscias:
al ĉiu, kiu dum la viv' orgias,
vi sendas ĝustan sumon da doloro.
Kvankam tremigas via man´ terura,
El mia sento ne naskiĝas timo
Al la infero kruda, sed ĥimera,
ĉar al kreito, nano kaj viktimo
de vivo, ja ne donos Justo Vera
eternan punon pro momenta krimo!

Mi plendas, sed mi ne ĝemas... Tio supra tamen estas poemo, kiu estas ĝemo kaj gemo...

kaj nenio pli.

Mallumo sieĝas kaj reĝas min... Mi tamen scias kaj konscias, ke mi havas nenion por pagi mian liberigon, ĉar eraroj estas ŝuldoj, sed tion ni kredas nur tiam, kiam jam estas nenia alia vojo...

- ... estas! ...

- Kiu ajn tion diras, li deliras: ... ne estas!...

- ... estas! ...

- Kiu ajn tion parolas, li frivolas: ... ne estas!...

- ... estas! ...

Pro mia Fundamenta Diino!... Estas kruele gesti pri savotabulo ne al dronanto, sed al droninto!... Tia mi estas.

- ... ne estas!... kaj povas eliri!...

- Misespero estas karcero...

- Sufiĉas unu sola ago, bonkora kaj utila, sen propra profito...

- Estas nenia tia...

- Pensu!

Nenia kompenso el penso en sieĝata menso: mi estas por eterne perdita: post vivo bandita

ne estas savo por krimolavo.

- ... estas! ... per senso kaj penso.

Subita ektremo balancis la ĉerkon:

- Aĥ, nesufiĉa.

- Tuj diru.

Kaj emocia voĉo komencas esti aŭdata:

- Antaŭ kelkaj tagoj mi prenis la lastan peceton de kuko kaj finis mian matenan manĝon. Tiam mi prenis la tason de kafo por porti ĝin al la kuvo en la kuirejo, kaj en ties fundo estis unucentimetra papilio, dronanta en kaforesto. Mi prenis ĝin, mi sekigis ĝin delikate per mia montrofingro, mi malfermis la fenestron kaj lasis ĝin sur ĝia rando sub atingo de suna varmo. Mi tiam vidis, ke ĝi kuŝas sur la dorso, la krurojn tremantaj de malvarmo. Mi sukcesis ĝin renversi, ke ĝi povu flugi. Por iom rapidigi la sekiĝon, mi elspiris sur ĝin dum kelkaj minutoj, ĝis ĝi ekmovis la flugilojn, sed jen mankis al ĝi fortoj kaj ĝi ekfalis, sed mano estis pli rapida kaj remetis ĝin sur la fenestran randon. Kaj venis pliaj minutoj da elspiro, kaj fine ĝi flugis for... Tio estis la sola fojo, kiam mi pensis pri alia, ne pri mi mem... Absolute

nesufiĉa.

Silento regis, kaj lamento ĝin segis:

- Ho ve... Mi pensis, ke mi aŭdis: ... estas!

Kaj jen:

- ... aŭdis. Ago kaj deklaro pardonigis vin: la ago savi la papilieton kaj la deklaro diri tion nesufiĉa.

SATano kaj satano eksaltis, nome li pensis, ke li saltis, ĉar estis nenia libera loko ekster lia korpo kovrita kaj premata sur ĝis tuta etendo:

- Pro la Diino...

- ... de la Fundamento. Voku vian papilieton, kaj diru al ĝi, kie vi estas.

Plej avide kaj rapide li tion faris per penso kaj menso kaj senso, kaj respondo venis preskaŭ antaŭ ol li komencis ĝin voki:

- aŭdis.

Kaj nenio okazis, sed la tempo tion pretervidis. Kaj pasis unu horo. Kaj pasis du horoj. Kaj pasis tri horoj. Kaj pasis... pasis... pasis... Ploro plendis:

- Sonĝo fariĝis pezumo... Aj... aj... aj... Pikoj de rompitaj brikoj trakuras mian korpon, sed ho miraklo: mi faris mian unuan movon post mia sveno kaj post mia morto...

Kaj li provis sin movi pli kaj plu: etendis manon, etendis brakon, etendis piedon, etendis kruron... Kaj paŝis antaŭen.

Tiam li vidis monteton de termitoj en plena laboro. Li restis komplete senscia:

- Kio estas tio?

Kaj li aŭdis konatan voĉon:

- Mi estas la papilieto, kiun vi savis, kaj mi venis, sed mi ne povis savi vin: via ĉerko estis dikega stumpo de amazonia trunko... Por ĝin rondiri mi bezonis tutan horon...

Mi pensis, kaj penso havas kompenson: mi kuris al termitejo kaj faris proponon, kiun la domanoj akceptis.

- Kion vi proponis?

- Mi simple diris, ke mi amas ilin, kaj do petas ilin veni manĝi enorman stumpon de amazonia arbo, kiu falis sur unu el miaj amikoj. Pluraj termitejoj venis, ĉar estis epoko sen manĝoj kaj ĉi tie manĝo abundis kaj fekundis...

- Mi dankas vin el mia tuta koro kaj bonvolu danki ilin en mia nomo.

- Ho ne! ili petis min danki vin por la manĝo...

- Mian koran dankon al la termitoj, kiuj donis al mi tion, kion neniam mi povus pagi! Kaj diru al ili, ke ili ne estas termitoj, sed terrealoj, kiuj donis al mi ne nur plian vivon, sed alian mondovidon kaj novan celon por miaj estontaj jaroj.

- Mi diros...

BIBLIOGRAFIO

MATTOS, G. *Ritmoj de vivo*. Rio de Janeiro: Kultura Kooperativo de Esperantistoj, 1968.



wwwesperantopt.com



# *Plebiscito*

***de Arturo Azevedo***

***trad. Roger de Castro Gotardi***

La sceno okazas en 1890[1].

La tuta familio kunvenas en la manĝoĉambro.

Sinjoro Rodrigues[2] purigas la dentojn per dentpikilo, tre komforte sidanta sur balancoseĝo. Li ĵus tromanĝis kvazaŭ abato.

Sinjorino Bernardino, lia edzino, tre atentostreĉas, purigante la kaĝon de belga kanario.

La infanoj estas du, knabo kaj knabino. Ŝi distriĝas, rigardante al la kanario. Li, korptuŝe ĉe la tablo, piedkruce, legas tre atente unu el niaj taggazetoj.

Silento.

Subite, la knabo kaplevas kaj demandas:

— Paĉjo, kio estas plebiscito?

Sinjoro Rodrigues tuj okulfermas por ŝajnigi, ke li dormas.

La etulo insistas:

— Paĉjo?

Paŭzo:

— Paĉjo?

Sinjorino Bernardino intervenas:

— Ho sinjoro Rodrigues, Manĉjo vokas vin. Ne dormu post la vespermanĝo, ĉar tio misfartigas vin.

Sinjoro Rodrigues ne havas alian rimedon, ol malfermi la okulojn.

— Kio estas? Kion vi deziras?

— Mi volus, ke paĉjo diru al mi, kio estas plebiscito.

— Jen, knabo! Do vi dekdujariĝos kaj ankoraŭ ne scias, kio estas plebiscito?

— Se mi scius, mi ne demandus.




Sinjoro Rodrigues turniĝas al sinjorino Bernardino, kiu plu estas tre okupata pri la kaĝo:

— Ho sinjorino, la etulo ne scias, kio estas plebiscito!

— Ne mirigas, ke li ne scias, ĉar ankaŭ mi ne scias.

— Kion vi diras?! Ĉu vi, sinjorino, ne scias, kio estas plebiscito?

— Nek mi, nek vi; ĉe ni, neniu scias, kio estas plebiscito.

— Neniu, haltu tuj! Mi kredas, ke mi jam donis pruvojn, ke mi ne estas ia sensciulo!

— Via mieno ne trompas min. Vi estas tro fanfaronema. Jen: se vi scias, diru, kio estas plebiscito! Do? Oni atendas! Diru!...

— Vi, sinjorino, volas inciti min!

— Sed, homo de Dio, kial vi devas ne konfesi, ke vi ne scias? Estas nenia honto nescii iun vorton. Ja alitage

[1] Tiam, Brazilo jam estis respubliko. La disfalo de la imperio, la proklamo de la respubliko kaj la preteratenta sinteno de la brazila popolo, eĉ en Rio-de-Ĵaneiro – tiama ĉefurbo –, estas pritraktataj de Arturo Azevedo en la rakonto *La maljuna Limo*, publikigita en La Karavelo n-ro 10, senpage elŝutebla el: http://www.esperantopt.com.

[2] Familinomo; prononcu kiel *Hodriges*.

okazis la samo, kiam Manĉjo demandis al vi, kio estas proleto. Vi parolis, parolis, kaj la knabo restis senscia!

— Proleto, tuj respondis sinjoro Rodrigues, estas malriĉa civitano, kiu vivas per laboro malbone pripagata.

— Jes, nun vi scias, ĉar vi iris al la vortaro; sed mi vetdonos al vi dolĉaĵon, se vi diros al mi, kio estas plebiscito, ne ŝovante la piedojn for de tiu seĝo!

— Kian plezuron vi, sinjorino, havas ridindigi min antaŭ la ĉeesto de ĉi tiuj infanoj!

— Ho! Ridinda vi mem vin igas! Estus tiel simple diri: *Mi ne scias, Manĉjo, mi ne scias, kio estas plebiscito; iru preni la vortaron, mia filo.*

Sinjoro Rodrigues impete ekstaras kaj kriegas:

— Sed mi scias!

— Se vi do scias, diru!

— Mi ne diros, por ne humiliĝi antaŭ miaj gefiloj! Mi ne cedas! Mi volas konservi la moralan forton, kiun mi devas havi en ĉi tiu domo! Iru al la diablo!

Kaj sinjoro Rodrigues, furiozega, forlasas la manĝejon kaj iras en sian dormoĉambron, perforte brufermante la pordon.

En la dormoĉambro estis tio, kion li plej bezonis en tiu okazo: kelkaj gutoj da akvo el oranĝofloro kaj vortaro…

La knabino transprenas la parolon:

— Kompatinda nia patro! Li koleretiĝis tuj post la vespermanĝo! Oni diras, ke estas tiel danĝere!

— Se li ne estus stulta – rimarkigis sinjorino Bernardino – kaj sincere konfesus, ke li ne scias, kio estas plebiscito!

— Jes, ja – intervenis Manĉjo, pentanta tre multe pri tio, ke li estas la senintenca kaŭzinto de tiu tuta diskutaĉo – jes, ja, panjo, alvoku paĉjon kaj interpaciĝu.

— Jes, jes! Interpaciĝu! – diras la knabino afable kaj petege. – Kia stultaĵo! Du homoj, kiuj tiom estimas unu la alian, kvereleti pro la plebiscito!

Sinjorino Bernardino kisas la filinon kaj iras manfrapi al la ĉambropordo:

— Sinjoro Rodrigues, venu sidiĝi, ne valoras la penon nervoziĝi pro afereto.

— La negocisto atendis la okazon. La pordo tuj malfermiĝas. Li eniras, trairas la domon, kaj eksidas sur la balancoseĝo.

— Sprite – kriegas Sinjoro Rodrigues post longa silento; — estas tre sprite! Mi! mi nescianta la signifon de la vorto *plebiscito*! Mi...!

La virino kaj la gefiloj proksimiĝas al li.

La viro daŭras per profunde dogma tono:

— Plebiscito…

Kaj rigardas ĉiuflanken, por vidi, ĉu estas ie iu alia, kiu povas profiti la lecionon.

— Plebiscito estas leĝo dekretita de la romia popolo, kunveninta en popolkunvenoj.

— Aĥ! – spirblovas ĉiuj, malafliktiĝintaj.

— Romia leĝo, ĉu vi bone komprenas? Kaj oni volas enkonduki ĝin en Brazilon! Jen alia fremdaĵo...!



Don Petro La Dua
dua kaj lasta imperiestro de Brazilo

# UNIVERSALAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO



*Djalma Pessata*

naskiĝis en la 27-a de marto 1960 en Rio de Ĵanejro, Brazilo, kie li loĝas kun siaj familianoj. Post la plenumado de diversaj profesioj, Djalma estiĝis instruisto pri la portugala lingvo. En 2004, li eklernis esperanton. De tiam, Djalma disvolvas diversajn agadojn ligitajn al la esperanta kulturo. Li verkas poemojn, surscenigas skeĉojn, en kiuj li mem aktoras, kaj dediĉiĝas al la verkado de dokument-videoj. La DVD *Zamenhof – Um cidadão do mundo* (*Zamenhof – Mondcivitano*), portugallingva dokumentvideo pri la vivo kaj verko de Zamenhof, estis lia unua verko eldonata de La Karavelo.

Ekde ĉi tiu numero, LK eldonos la rubrikon *Universalaj Kongresoj de Esperanto*, sub la aŭtoreco de Djalma Pessata, en kiu nia plej ĵusa kunlaboranto prezentos la okazintajn universalajn kongresojn de esperanto.

***JJS***


# 1905

## *1-a Universala Kongreso de Esperanto*



**Loko:** Bulonjo-ĉe-Maro, Francio
**Dato:** 7-a ĝis 12-a de aŭgusto
**Aliĝintoj:** 688

La kongreso havis brilan sukceson. Tie estis solvitaj gravaj problemoj. ***La Deklaracio pri Esperanto*** datas de ĉi tiu kongreso. La 9-an de aŭgusto estis aprobataj la ***Fundamento***, la **Lingva Komitato**, la **flago** kaj la himno de esperanto.



**La flago de Esperanto** estis origine la flago de la Esperanto-Klubo en Bulonjo-ĉe-Maro (Francio), kaj ĝin oni adoptis okaze de la unua Universala Kongreso, 1905. La verdo simbolas la esperon, la blanko la pacon kaj neŭtralecon, la kvinpinta stelo la kvin (laŭ tradicia kalkulo) kontinentojn.





Memoriga poŝtmarko pri la 1-a kongreso.





***La Espero*** estas poemo verkita de Ludoviko Lazaro Zamenhof. La belga konsulo kaj muzikisto Félicien Menu de Menil verkis la muzikon de la himno *La Espero*.

La advokato **Alfredo Michaux** estis la ĉefa organizinto de la 1-a Universala Kongreso de Esperanto.







En 1905, **Paul Berthelot** fondis la tradician **revuon Esperanto**.




**Edmond Privat** (1889-1962), juna sviso, estis unu el la famaj partoprenintoj en la Unua Kongreso de 1905, en Bulonjo-ĉe-Maro, kien li piediris.

**Zamenhof** faris belan paroladon en Esperanto dum la 1-a UK, ĝin finante per preĝo verkita de li, sub la titolo ***Preĝo sub la Verda Standardo***, kiu estas neŭtrala kaj profunde universalisma preĝo.







En la 10-a de aŭgusto, okazis tuttaga **ekskurso** de Boulogne-sur-Mer al Pas-de-Calais, en Francio, kaj poste al Folkestone kaj Dover, en Anglio, per la ŝipo Onward.




**Teatraĵoj Prezentitaj en la 1-a UK**

***Mensogo pro Amo***, de Eugène Labiche, kaj ***Edziĝo per Telefono***, de Jacques Ferneuze, ambaŭ prezentitaj de amatora trupo el Francio.
**Kontraŭvola Edziĝo**, de Molière. Tradukis Victor Dufeutrel. Prezentis amatora 10-persona trupo el 8 landoj.
***Hamleto***, de Shakespeare. Deklamis monologon angla komponistino kaj kantistino F. L. Schäfer.

**La antaŭkongreso** okazis en Salono Conway, en Parizo, sed la plejparto de la kongreso okazis en la urba teatrejo, kiu estis tute ornamita per verdaj flagoj de la loka esperantogrupo.
En la apuda foto, la foriro de kelkaj partoprenantoj el la kongresejo.







En la 1-a UK okazis pluraj paroladoj, inter kiuj, **Émile Boirac**, prezidanto de LKK, parolis pri la plej taŭga procedo por enkonduki Esperanton en la programon de lernejoj. **Edmond Privat** parolis pri propagando inter junularo, **Kabe** parolis pri internacia esperantista ligo kaj **Zamenhof** faris kritikon kaj klarigojn pri prononcado.


KaBe
(Kazimierz Bein)





Lunde, la 7-an de aŭgusto, okazis fratiĝa kunveno inter protestanta (Friedrich Schneeberger, live) kaj katolika (Emile Peltier, dekstre) pastroj.




En julio 1905 la londona revuo ***The British Esperantist*** organizis kantverkan konkurson pri la tiam venonta kongreso en Bulonjo. Venkis la kanto *Kongresa Tag'* , de Charles Reeve, el Londono. Jen la refreno, laŭ la famkonata *Funiculi Funicula*:

Ni kunvenu por kongresa tag'
En Bulonjon sub la verda flag'.
Malpaco ja ne daŭru plu:
Ne estas ni fremduloj plu;
Esperanta frato estas ne fremdulo plu.

Ankaŭ lunde, vespere, okazis balo en ŝikaj kostumoj, krom naciaj dancoj.

La urbestro de Bulonjo ordonis pretigi festenon por multnombraj kongresanoj.




*　*　*　*　*




***Zamenhof - Um cidadão do mundo - DVD: 15 eŭroj (Kodo: 03)***
dokumentvideo de Djalma Pessata
Lingvo: portugala (de Brazilo)

*La vivo de Zamenhofo, iniciatinto de la Internacia Lingvo Esperanto, prezentiĝas al la portugallingva publiko, ekde lia naskiĝo, en 1859, ĝis lia morto en 1917. La geografia kaj historia fono komprenigas la politikan, militan kaj etnan perturbadon, en kiu Eŭropo sin trovis je la tempo de Ludoviko Lazaro Zamenhofo. Tiel, la genieco de la poliglota kuracisto trovis en la diskriminado, en la rasismo kaj en la ĝenerala malkomprenado la fekundan grundon al lingva verkaĵo: la kreado de lingvo, kiu, naskiĝinta el la naturaj, sin prezentas regula kaj logika, adekvata al la internaciaj rilatoj, celante estiĝi bazo de interkomprenado inter la homoj. La unuaj internaciaj kongresoj de esperanto defilas antaŭ niaj okuloj, mirigante nin, pro ilia grandeco ankoraŭ malkonata de tiuj, kiuj ankoraŭ ne havis sian unuan renkontiĝon kun esperanto.* ***Noto:*** *Laŭ la kontrakto kun la aŭtoro, La Karavelo estas la sola eldonejo produktanta kaj komercanta ĉi tiun varon ekster Brazilo.*

## Esperanto pulsas... en Karirio

**João José Santos**

En la lasta novembro, *Rádio Cidade do Sumé*, en Brazilo (subŝtato Paraibo, regiono Karirio, urbo Sumeo) dissendis unu-horan disvastigan intervjuon pri esperanto. Ĉi tiun radion povas kapti ĉirkaŭ 10 milionoj da homoj, kvankam oni ne certas, kiom da ili fakte aŭskultas ĝin, kaj specife ĉi tiun intervjuon.

La intervjuistino Jacquelline Oliveira tiam interparolis kun João Aurélio kaj kun João José Santos. Ĉi tiu laboro estas disvolviĝinta de João Aurélio, brazila esperantisto kiu loĝas en la nordo de Portugalio. Li naskiĝis en la regiono Karirio, kaj kvankam tre for de



Jacquelline Oliveira estras la radion *Rádio Cidade do Sumé*

sia lando, li disvolvas agadon por disvastigi esperanton en Karirio, montrante ke la amon al la lulgrundo la distanco ne nur ne nuligas, sed eĉ fortikigas.

Aldone al la laboro disvolviĝinta en la radio, João Aurélio kontaktas urbodomojn kaj instruistojn por ekirigi esperanton en la kariria regiono.



João José Santos klarigas pri esperanto

## Esperanto pulsas... en la gimnazio de Estremozo

**João José Santos**

La 6-an de novembro 2008, okazis du prelegoj pri esperanto, kun montrado de kelkaj videoj plukitaj el *Youtube*, en la gimnazio de Estremozo: *Escola Secundária/ 3 Rainha Santa Isabel*. Ĉiu el la prelegoj estis unuhora.

Entute estis tie 55 lernantoj, kies jaraĝoj estas inter 12 kaj 18, el kvar klasoj de la 7-a, 9-a, 11-a kaj 12-a lernjaroj. Kvin instruistoj ankaŭ aŭskultis la prelegojn: du prianglaj instruistoj, unu priportugala kaj du pri fizik-kemio. Estas interese scii, ke la disvastiga agado pri esperanto disvolviĝis far la departamento pri angla kaj kastilia lingvoj. Tio montras, ke se la disvastigo estas lerte farata, eĉ la instruistoj pri la angla kaj pri la kastilia povas labori por esperanto. Ili komprenas, ke esperanto ne malamikas kontraŭ iu ajn alia fako, kaj ke ĝia lernado devas esti paralela al la aliaj fakoj.




Blazono de la urbo Estremozo




# La regiono Karirio en Brazilo


*Trapasanta kelkajn subŝtatojn de la brazila nordoriento, la regiono Karirio estis enloĝita de la kariri-popolo longe antaŭ la alveno de la portugaloj. El la diversaj kaririaj lingvoj, kvar estis priskribataj kaj do estas konataj. La subaj fotoj estas el diversaj subregionoj de Karirio. Akvon la karirianoj tre deziras, kaj ĝia ofta manko, temo en la kantoj de tiu regiono, estas la kaŭzo de la malfavoraj vivkondiĉoj de multaj karirianoj.*

***João José Santos***



Preĝejo de la urbo *São João do Cariri*, en orienta Karirio, subŝtato *Paraíba.*







Elfrukta frandaĵo el Karirio.



Urbo *Sumé*, kie situas *Rádio Cidade do Sumé*, en okcidenta Karirio, subŝtato *Paraíba.*





Elsalikoka manĝaĵo, tipa de Karirio.



Urbo *Crato*, en la kariria regiono apartenanta al la subŝtato *Ceará.*



www.esperantopt.com